

MODELTESTO DE LA EKZAMENO
UEA-KER C2
SKRIBA PRODUKTADO
SOLVOJ

Modelsolvoj

RIMARKO: ĉiu modelsolvo baziĝas je vera(j) ekzamenprodukto(j), ĝi estas eventuale leĝere redaktita (ekz. pro evidentaj tajperaroj). Ĝi estas UNU EL la eblaj solvoj, ne nepre 100 %-a laŭ ĉiu (kaj ĉies!) vidpunkto, sed konvena al la nivelo C2.

Tasko 1

Altestimata S-ino Kastelo,

Mi dankas vin pro via respondo, tamen respektoplene ree prezentas la peton pri rekonsidero de la decido de la Urba Administrato.

Vi prave argumentas, ke oni devas teni sin je demokratia proceduro. Tamen, unu el la bazoj de demokratio estas ampleksa aliro al informoj. Kiel dirite en mia letero el la 15a de Januaro, la loĝantoj de Akvoŝparstrato ne estis sufiĉe bone informataj pri la karakterizaĵoj de la tri elektebloj, kaj tio estus respondeco de via Administrato.

Pro tiu informmanko, multaj homoj voĉdonis por magnolio, kies fruktoj ne manĝeblas kaj kies produktado de floroj dependas de specifaj grundaj kondiĉoj - eĉ kun tiuj kondiĉoj, ili apenaŭ daŭras du semajnojn jare. Amelanĉo, male, produktas fruktojn manĝeblajn por homoj kaj birdoj, kaj ĝi estas arbo rondforma, kies foliaro daŭras la tutan jaron. Bedaŭrinde ĉi-lastaj planto ne ankoraŭ estas konata en nia regiono.

Pli konsciaj pri tiuj karakterizaĵoj, 90% el la koncernatoj esprimas sin favore al amelanĉo, kio reprezentas pli maturan, konscian elekton de tiuj homoj, sekve ĉi tiu elekto ja respegulas pli efektive demokratian decidon. 90% el la loĝantoj, kiuj dum jardekoj devos kunvivi kun tiuj arboj, nun pledas pri vere demokratia agado viaflanke.

Dankon pro via komprenemo,

B.T.

Tasko 2 – Temo 1

1. Geedziĝo en Parizo

Ĉi monate, nia rubriko "Nia mondo en mia vivangulo" pritraktos geedziĝon en la ĉefurbo de Francio. La rilato al geedziĝo tiel buntas kiel la pariza loĝantaro. Tamen en tiu artikolo mi provos kompili ĉiajn respondojn ricevitajn dum mia opini-enketo.

Ĝenerale, malpli kaj malpli da geedziĝoj okazas ĉiujare en Parizo. Multe da intervjuitoj diris ke ilia prijuĝo tute malsamis al tiu de ilia gepatroj. La hodiaŭaj junuloj ŝajne mapli volonte volas oficiale engaĝiĝi. Pluraj asertis, ke la geedza institucio ne plu vere utilas krom por pagi malpli da impostoj. Malnovaj generacioj kvazaŭ aŭtomate geedziĝis kiam ili enamiĝis kaj volis naski infanojn, nova generacio multe pli hezitas. Spektinte la ĉiam kreskantan nombron de maledziĝoj, ni povas kompensi ke la prijuĝo de geedza institucio tute ŝanĝiĝis en kelkaj jardekoj.

MODELTESTO DE LA EKZAMENO
UEA-KER C2
SKRIBA PRODUKTADO
SOLVOJ

Pluraj intervjuitoj parolis pri la pezo de tradicioj kaj de familioj en la ceremonioj. Pli kaj pli da intergentaj paroj formiĝas en nia kosmopolita urbo, sed ofte familioj ne volas rezigni pri siaj religiaj aŭ gentaj tradicioj. Sinsekve por eviti interfamiliajn konfliktojn junulaj paroj decidas entute ne geedziĝi aŭ elektas diskretan civilan geedziĝon en la urbodomo. Ĉiuj bedaŭris tiun situacion kaj volus enkonduki modernecon en siajn eventualajn ceremoniojn.

Pro moderneco, granda parto de la enketitoj jam elektis novtipajn ceremoniojn. La tradiciajn restoraciojn ili forlasis kaj elektis surprizajn ceremoniejojn kiel promeniŝipon, halon de muzeo, salonon de koncertejo. Vi komprenas, ke pli facilas liberiĝi de tradiciaj lokoj kiam via budĝeto sufiĉe altas.

Ĝenerale rezignintoj pri geedziĝo klarigis la pezan rolon de religio. Ili plendis pri tro striktaj kutimoj aŭ pri malakcepto de alireligiano. Jen tre bedaŭrinda afero en nia nuna mondo.

Nuntempe pluraj administraj sistemoj kreiĝis kaj ebligas paran vivon kun preskaŭ ĉiuj avantaĝoj de oficiala geedziĝo. Pluraj paroj elektis tiun rimedon por eviti pezajn tradiciojn kaj familiajn aprobojn. Tiuj administraj sistemoj permesas al infanoj heredi el la du gepatroj kaze de morto, elekti kies familionomon ili portos ekde sia dekok-jariĝo. Konsiderindas tamen ke ekspariĝo en tiuj novaj sistemoj estas same komplikaj kiel oficialaj eksedziĝoj ...

Kaj nun, kiel mi povus ne paroli pri tiuj multnombraj "rekonstruitaj familioj"? Pluraj homoj parolis pri siaj unua vivo, dua vivo. Pli kaj pli ofte homoj fondas unuan familion, eksedziĝas kaj konstruas novan familion kun alia eksedziĝinto kiu jam havas siajn proprajn gefilojn.

Konklude tre malfacilas priskribi ĝeneralajn trajtojn de nia pariza loĝantaro rilate al geedziĝo. Plej diversaj situacioj ekzistas kaj montras precipe, ke administracio pene sekvas kaj enkadrigas la novajn vivmanierojn de la pariza loĝantaro. Kiel en aliaj terenoj, vivkutimo tre vigle evoluis kvankam administracio iom lamas.

Post tiu studo de la geedziĝa institucio, estus interese trakti la tuj sekvontan temon, nome edukado de infanoj. Ĉu infano devas esti vartata kaj edukata de siaj naturaj gepatroj aŭ de amantaj gepatroj? Ĉu plis gravas tradicia familio aŭ amanta familio?

2. Vento de libereco en Barato

"Mi rajtis elekti alikastaninon kiel mian vivpartneron!" ĝoje diris s-ro P. "Kaj tio eblis", li klarigis, "ĝuste ĉar mi loĝas for de mia vilaĝo. Se mi estus en mia vilaĝo, ne mi, sed la familianoj estus decidintaj ĉion pri mia geedziĝo."

S-ro P. aludas al la tradicia kutimo en Barato (kaj ankaŭ aliloke en la Hinda Duonkontinento). Nome, ĉiuj decidoj pri la geedziĝo estas faritaj de la familianoj, ne de la gejunuloj mem. Kaj inter la familianoj estas la plej aĝaj viroj kaj virinoj kiuj havas la plej fortan voĉon. Tiuj decidoj preskaŭ ĉiam estas bazitaj sur la kastsistemo de hinduismo. Krom la kvar grandaj kasto -- la Bramanoj (la ekleziuloj); la Kŝatrioj (la militistoj); la Vajŝjoj (la komercistoj); kaj la Ŝudroj (la "netuŝebluloj") -- krom tiuj kvar estas sennombreblaj subkasto kaj eĉ sub-subkasto! Geedziĝaj decidoj estas faritaj ene de tiu kapskuige malsimpla sistemo.

MODELTESTO DE LA EKZAMENO
UEA-KER C2
SKRIBA PRODUKTADO
SOLVOJ

(Tange, oni rimarku, ke oni parolas ĉi tie nur pri heteroseksaj geedzigoj; la samseksaj eĉ ne penseblas!)

S-ro P. eskapis ĉion ĉi kiam li elmigris al granda metropolo for de sia vilaĝo. Tie, en sia laborejo, li renkontis s-inon K. Ili enamiĝis kaj decidis geedziĝi. "Ho, feliĉaj geamantoj, kiuj kvazaŭ birdoj, konstruas neston!" (kiel diras la poeto). S-ino K. estis de alia kasto; en la vilaĝo la geedziĝo estus malaprobata de ambaŭ familioj.

En la urbo, tamen, ili iris al loka kortumo kaj laŭleĝe kunvivas. En ilia kvartalo loĝas pluraj tiaj paroj. "En la najbara hejmo la viro estas kristano kaj la virino islamano. Ne gravas eĉ la religio!" deklaris s-ino K. Tiuj ĉi estas grandaj ŝanĝoj en la prijuĝo de la granda institucio.

Progresema landa konstitucio kaj leĝaro faciligas tiun ĉi transiron de tradiciaj limoj kaj pensmanieroj al moderna vivmaniero en kiu gravas la decidopovo de individuoj. Tio ĉi aparte gravas al virinoj kiuj tradicie havas malfortan voĉon en geedziĝaj decidoj.

S-ino K. povis ne nur lasi sian vilaĝon por eklabori en la metropolo. Ŝi ankaŭ povis elekti sian vivpartneron. Gravas ankaŭ tiu unua punkto: nome, eklabori. En tradicia kunteksto, ofte estis malpermesate por virinoj labori ekster la hejmo kontraŭ mono. Des pli post la edziniĝo. S-ino K. ne nur faris tion antaŭ la geedziĝo, sed daŭre faras tion eĉ nun. Tiu financa ekvilibro inter la viro kaj virino en si mem ŝanĝas la interrilatojn.

Kiel diris s-ino K. "Mia edzo respektas kaj mian kapablon labori en mia posteno, kaj mian monkontribuon al la familio. Kaj kiam la parencoj ambaŭflankaj tion vidas -- jes nun ili 'pardonis' nian pekon [ridante] -- aparte la gejunuloj en ambaŭ familioj sentas la venton de libereco!"

Jes ja! Jen nova vento en Barato!

Tasko 2 – Temo 2

Du lecionoj pri timo

Unu el la celoj de verkistoj estas speguli la homajn emociojn, klarigi aferojn kiujn la legantoj ne konscias aŭ ne kapablas mem esprimi. En la du verkoj kiujn ni legis por nia diskutrondo, la timo estas evidenta aspekto de la travivaĵoj de la priskribitaj individuoj. Preskaŭ ĉiuj homoj spertis timon iam dum la vivo, foje aŭ konstante. Ĝi povas ekregi la pensadon aŭ pro manko de la amo kiu kapablas forigi timon, aŭ pro nescio, neantaŭvideblo de okazontaĵoj kaj situacioj kiuj indikas nesekurecon.

En la novelo "Tra la loko ensorĉita" de Ŝirjaev, Patro Johano devis vojaĝi al urbeto kelkajn kilometrojn for de la hejmo por plenumi pastrajn respondecojn por tiuregiona paroĥano. Pro la vetero malfacilis la vojaĝo, li dormetis, kaj vekiĝis, kaj post rekonsciiĝo konstatis ke mankas lia ŝoforo, aŭ kaleŝa gvidanto. Li provis per vipo regi la ĉevalon kaj kuraĝigi ĝin antaŭeniri. Ne eblis ĉar la ĉevalo pliprofondiĝis en la koton. La pensoj venis, ĉu mi ne postvivis? Tamen feliĉe revenis la prizorganto, sed li respondecis pri alia timo. Li atentigis pri la plorado, kriado de junulino kiun ili povis aŭskulti. Li rakontis pri la morto de junulino perfortita de grafo kaj liaj gastoj en festo. La pastro, pro sia religia kredo, aliĝis al la aserto de la ŝoforo ke ili estas diaj,

MODELTESTO DE LA EKZAMENO
UEA-KER C2
SKRIBA PRODUKTADO
SOLVOJ

evidente pro tio protektitaj kontraŭ danĝero aŭ malbonaj spiritoj. Pro tio ke Dio protektas sian kreitaĵaron, ili povis fidi ke la timo ne estas pli potenca ol la protekta dia amo.

La novelo reliefigas ke en la homa vivo povas prezentiĝi kazoj neklarigeblaj, sed oni devas kuraĝe ilin fronti kaj fidi por povi helpi aliajn.

La dua novelo "Kiel Mihok instruas angle" de Julio Baghy prezentas alian situacion, en kiu la ĉefrolanto Miĥaelo Mihok, kaptita servisto de rusa leŭtenanto, timis pri sia pozicio kaj sekureco se li ne bone servos sian mastron. Pro tio ke li ne scipovis la rusan lingvon, ĉiam estis danĝero de miskompreno kaj tuja puno se li miskaptis ordonon aŭ alimaniere misfaris. La leŭtenanto deziris lerni lingvojn kaj supozis ke eŭropano nature scipovas plurajn, do li enketis pri la lingvoscio de Mihok. Mihok ne estis sukcesa lingvolernanto, kaj efektive lia sola sukceso estis pri Esperanto. Do li aŭdacis, por ne rikolti la koleron aŭ malestimon de la oficiro, pretendi scipovon de aliaj lingvoj, kaj kiam la leŭtenanto interesiĝis pri lernado de la angla lingvo, li indikis ke li kapablas komplezi. Li decidis instrui al li Esperanton, kun la konstanta timo ke je ajna momento povis malkovriĝi la ruzo. Devigite legi anglalingvan ĵurnalon, li legis de ĝi en flua Esperanto. Ĉio sukcesis ĝis alveno de vizitanto kiu scipovis la anglan pro kontakto kun usonano. Li elturniĝis klarigante ke la klasika aristokrata angla tre diferencas de tiu dialekto.

La leciono ĉi-foje estis ke ruzemo kaj solvemo ebligas al ni venki timigajn situaciojn: kiel per inteligenta ruzemo Mihok sukcesis postvivi la militkaptitan situacion, same la invito al Esperanto-klubo montris al la leŭtenanto ke li kapablas komuniki kun plej diversaj nacioj en sia lernita "angla lingvo".

Pritaksado de la skriba produktado

1. Oficiala letero		2. Eseo / artikolo / recenzo	
Pritaksaj kriterioj	Poentoj	Pritaksaj kriterioj	Poentoj
enhavo:	5	enhavo:	8
<ul style="list-style-type: none"> • konformo al la taskopriskribo, longeco • argumentado • adaptiĝo al la adresito 	2 2 1	<ul style="list-style-type: none"> • konformo al la taskopriskribo, longeco • adaptiĝo al la celpubliko • strukturigo, proporcioj • originaleco, ideo-riĉeco 	4 1 2 1
tekstigo:	10	tekstigo:	17
<ul style="list-style-type: none"> • revortumo, kohero • leksika vasteco • gramatika ĝusteco, komplekseco kaj varieco 	5 2 3	<ul style="list-style-type: none"> • kohero, logiko, konsekvenco • leksika vasteco • gramatika ĝusteco, komplekseco kaj varieco 	5 6 6
Sume	15	Sume	25

MODELTESTO DE LA EKZAMENO
UEA-KER C2
SKRIBA PRODUKTADO
SOLVOJ

UEA-KER C2 – Skriba produktado – Poentumaj skaloj

Tasko 1

a) enhavo

Pritaksaj kriterioj	0 poento	1 poento	2 poentoj
<ul style="list-style-type: none"> konformo al la taskopriskribo, longeco 	<ul style="list-style-type: none"> mankas teksto aŭ ĝi ne ampleksas 60%-jn de la priskribita longeco la produktita teksto ne traktas la temojn laŭ la instrukcioj 	<ul style="list-style-type: none"> la produktita teksto nur parte sekvas la instrukciojn ĝi ne ampleksas la priskribitan longecon 	<ul style="list-style-type: none"> la produktita teksto sekvas ĉiujn erojn de la instrukcioj ĝi ampleksas la priskribitan longecon
<ul style="list-style-type: none"> argumentado 	<ul style="list-style-type: none"> tute mankas aŭ estas nur 1-2 argumentoj la argumentoj ne rilatas la taskon 	<ul style="list-style-type: none"> la traktitaj problemoj ne estas sufiĉe argumentitaj la argumentoj ripetiĝas aŭ ne estas sufiĉe detaligitaj mankas logiko en la argumentado 	<ul style="list-style-type: none"> abundas trafaj kaj novaj argumentoj por la tuŝitaj problemoj la argumentado havas internan logikon, estas sufiĉe detala por helpi kompreni la interligojn
<ul style="list-style-type: none"> adaptiĝo al la adresito 	<ul style="list-style-type: none"> mankas aŭ ne estas konvenaj la leter-formalaĵoj la tono estas malkonvena 	<ul style="list-style-type: none"> uzo de konvenaj formalaĵoj taŭga tono redaktaj ktp. helpoj por facile trarigardi kaj sekvi la enhavon 	

Tasko 1

b) tekstigo

Pritaksaj kriterioj	0 poento	1 poento	2 poentoj	3 poentoj	4 poentoj	5 poentoj
<ul style="list-style-type: none"> revortumo, kohero 	<ul style="list-style-type: none"> mankas enkonduka kaj konkluda partoj plejparte enhavas simplajn 	<ul style="list-style-type: none"> mankas enkonduka aŭ konkluda parto la frazoj kaj propozicioj ligiĝas 	<ul style="list-style-type: none"> estas en la produktita teksto enkonduko kaj konkludo, sed ĉi-lasta preskaŭ 	<ul style="list-style-type: none"> la enkonduka, argumentadaj kaj konkluda partoj estas koheraj 	<ul style="list-style-type: none"> la unuoj de la produktita teksto estas organizitaj en proporciaj alineoj 	<ul style="list-style-type: none"> la unuoj de la produktita teksto estas organizitaj en proporciaj alineoj; varia

MODELTESTO DE LA EKZAMENO
UEA-KER C2
SKRIBA PRODUKTADO
SOLVOJ

Pritaksaj kriterioj	0 poento	1 poento	2 poentoj	3 poentoj	4 poentoj	5 poentoj
	frazojn, la kompleksaj ligiĝas per la konjunkcioj „kaj” aŭ „sed” - tro granda parto de la produktita teksto estas laŭvorta ripeto de la helpotekstoj	per diversaj konjunkcioj kaj kelkfoje per rilativoj - ne preciza uzo de koheriga elemento estas konstatebla - kelkaj frazoj rekoneble sekvas la strukturon de la helpotekstoj	laŭvorte ripetas la unuan - la kunligo de propozicioj estas ĝenerale konvena, oftas subjunkcioj - la proporcio de simplaj kaj kompleksaj frazoj estas pli-malpli egala - konstateblas strebo al revortigo de la helpotekstoj	unuoj, ili aperas en alineoj - inter la alineoj ne ĉiam estas kunligo - por la koherigo de la propozicioj kaj frazoj estas uzata sufiĉe vasta gamo de subjunkcioj (ĉefe rilativoj) kaj participaj strukturoj - la helpotekstoj estas densigitaj kaj plejparte revortumitaj	- la teksto estas kohera tuto danke al tre diversaj koherigaj strukturoj kaj vortoj, el kiuj kelkaj kvankam konvenaj, estas iom kliŝecaj - la helpotekstaj informoj aperas en densigita formo kun revortumoj	interpunkciado helpas sekvi la kompleksan teksto-strukturon - estas taŭge uzataj abundaj kaj variaj koherigaj vortoj, strukturoj - la helpotekstaj informoj aperas aŭ alude aŭ en celkonforma densigo kun trafikaj revortumoj
• leksika vasteco	- la vorttrezoro estas malvasta por varie esprimi kompleksajn pensojn - ripetoj oftas, sinonimoj mankas	- la sufiĉe vasta uzo de sinonimoj kaj derivitaj vortoj ebligas varian tekston, kun malmultaj ripetoj	- la produktita teksto estas preciza kaj nuancita - la ripetoj estas evititaj per sinonimaj vortoj aŭ esprimoj			

MODELTESTO DE LA EKZAMENO
UEA-KER C2
SKRIBA PRODUKTADO
SOLVOJ

Pritaksaj kriterioj	0 poento	1 poento	2 poentoj	3 poentoj	4 poentoj	5 poentoj
	- rimarkeblas malĝusta uzo de vortoj, esprimoj		- konvenaj derivaĵoj donas specialan karakteron al la teksto			
<ul style="list-style-type: none"> gramatika ĝusteco, komplekseco kaj varieco 	- la produktita teksto konsistas el aro de simplaj frazoj - troviĝas en ĝi sintaksaj eraroj	- en la gramatike senerara teksto estas uzataj variaj verbotempoj kaj –modoj - la produktita teksto estas riĉa je prepoziciaj esprimoj	- en la gramatike senerara teksto estas uzataj variaj verbotempoj kaj –modoj - ĝusta uzo de subjunkciaj prepoziciaj kaj participaj strukturoj	- varia kaj senerara uzo de ĉiuspecaj gramatikaj elementoj serve al preciza esprimo de kompleksaj ideoj kaj rilatoj		

Tasko 2

a) enhavo

Pritaksaj kriterioj	0 poento	1 poento	2 poentoj	3 poentoj	4 poentoj
<ul style="list-style-type: none"> konformo al la taskopriskribo, longeco 	- mankas teksto aŭ ĝi ne ampleksas 60%-jn de la priskribita longeco - la produktita teksto ne traktas la temojn laŭ la instrukcio	- la produktita teksto nur parte sekvas la ĉefinstrukcion - ĝi ne traktas konvene la subtemojn / en la literatura analizo la	- la produktita teksto pli-malpli sekvas la ĉefinstrukcion - ĝi konvene traktas unu subtemon, la aliaj aŭ tute ne aŭ nur skize estas prezentitaj / ĝi rakontas la historion de	- la produktita teksto sekvas la ĉefinstrukcion: ĝi resumas opiniojn / prezentas la novelojn analize - ĝi konvene traktas du subtemojn, la tria aŭ tute ne aŭ nur skize	- la produktita teksto sekvas la ĉefinstrukcion - ĝi konvene traktas ĉiujn subtemojn / ĝi prezentas analizon de ambaŭ noveloj laŭ ĉiuj

MODELTESTO DE LA EKZAMENO
UEA-KER C2
SKRIBA PRODUKTADO
SOLVOJ

Pritaksaj kriterioj	0 poento	1 poento	2 poentoj	3 poentoj	4 poentoj
		laŭinstrucia temo ne aperas konvene - ĝi ne ampleksas la priskribitan longecon	la novelo(j) kaj provas aldoni analizon laŭ unu punkto de la instrukcio - ĝi ampleksas la minimuman longecon	estas prezentita / ĝi traktas ambaŭ novelojn kaj aldonas analizon laŭ kelkaj punktoj de la instrukcio	punktoj de la instrukcio
<ul style="list-style-type: none"> adaptiĝo al la celpubliko 	- la produktita teksto ne konsideras sian celpublikon	- la produktita teksto estas artikolo kun atentokapta titolo kaj konvena tono - estas klara la centra ideo de la verkinto kaj la tuto de la artikolo helpas la legantojn sekvi la ĉef-fadenon			
<ul style="list-style-type: none"> strukturigo, proporcioj 	- traktas la subtemojn / analizajn vidpunktojn kvazaŭ ili estus demandoj aparte respondendaj	- la subtemoj / analizaj vidpunktoj havas pli-malpli la saman amplekson - la laste traktita subtemo / vidpunkto de la artikolo estas malpli detaligita supozeble pro ekstera premo (amplekso aŭ tempo)	- la subtemoj / analizaj vidpunktoj estas pondataj kaj traktataj en konvena amplekso - ilia vicordo estas logika laŭ la ĉefideo de la verkinto - la denseco de informoj estas konvena - la asertojn ilustras trafaj ekzemploj		

MODELTESTO DE LA EKZAMENO
UEA-KER C2
SKRIBA PRODUKTADO
SOLVOJ

Pritaksaj kriterioj	0 poento	1 poento	2 poentoj	3 poentoj	4 poentoj
		- la denseco de informoj estas pli-malpli konvena - la asertojn ilustras kelkaj ekzemploj	- la artikolo montras ecojn de konvena planado		
<ul style="list-style-type: none"> • originaleco, idea riĉeco 	- la produktita teksto rakontas ĝeneralaĵojn - la ekzemploj estas banalaj aŭ ne interesaj por vasta publiko	- la produktita teksto aldonas al la faktoj iun idean pluson, kiu igos la artikolon interesa por la legantoj			

Tasko2

b) teststigo

Pritaksaj kriterioj	0 poento	1 poento	2 poentoj	3 poentoj	4 poentoj	5 poentoj	6 poentoj
<ul style="list-style-type: none"> • kohero, logiko, konsekvenco 	- mankas enkonduka kaj konkluda partoj - la produktita teksto enhavas plejparte simplajn frazojn, la kompleksaj ligiĝas per la	- mankas taŭga enkonduka aŭ konkluda parto - mankas logiko en la tema vicordo - la frazoj kaj propozicioj ligiĝas per	- la enkonduka kaj konkludaj partoj ne kongruas kun la ĉefideo aŭ inter si - estas malfacile trovi la logikon de la tema vicordo	- la subtemoj estas apartigitaj en alineoj - la alineoj estas pli-malpli strukturitaj, plejparte logikaj kaj konsekvencaj	- la subtemoj estas organizitaj en proporciaj alineoj - la alineoj estas pli-malpli strukturitaj, plejparte logikaj kaj konsekvencaj	- la subtemoj estas organizitaj en proporciaj alineoj; varia interpunkciado helpas sekvi la kompleksan teksto-strukturon	

MODELTESTO DE LA EKZAMENO
UEA-KER C2
SKRIBA PRODUKTADO
SOLVOJ

Pritaksaj kriterioj	0 poento	1 poento	2 poentoj	3 poentoj	4 poentoj	5 poentoj	6 poentoj
	konjunkcioj „kaj” aŭ „sed” - la tempo-aspekto kaj / aŭ la aŭtora vidpunkto ŝanĝiĝadas senkiale	diversaj konjunkcioj kaj kelkfoje per relativoj	- la kunligo de propozicioj estas ĝenerale konvena, oftas subjunkcioj - la proporcio de simplaj kaj kompleksaj frazoj estas pli-malpli egala	- en la tema vicordo rimarkeblas interna logiko - por la koherigo de la propozicioj kaj frazoj estas uzata sufiĉe vasta gamo de subjunkcioj (ĉefe relativoj) kaj participaj strukturoj	- la teksto estas kohera tuto danke al tre diversaj koherigaj strukturoj kaj vortoj, el kiuj kelkaj kvankam konvenaj, estas iom kliŝecaj	- estas taŭge uzataj abundaj kaj variaj koherigaj vortoj, strukturoj	
● leksika vasteco	- estas uzata simpla, baza vorttrezoro - derivaĵoj maloftas - aperas pluraj leksikaj malkonvenaĵoj, kiuj malhelpas la komprenon	- la vort-trezoro estas malvasta por ebligi varian esprimon de kompleksaj pensoj - ripetoj oftas, sinonimoj mankas - rimarkeblas malĝusta uzo de vortoj,	- la vorttrezoro ne estas sufiĉe vasta por varie esprimi kompleksajn pensojn - ripetoj rimarkeblas, sinonimoj mankas - kelkfoja malĝusta uzo de vortoj,	- la sufiĉe vasta vorttrezoro kaj la uzo de sinonimoj ebligas pli-malpli varian tekston, kun malmultaj ripetoj - la stilo mem restas iom plata	- la leksika vasteco ebligas disvolvon de la kompleksa temo - trafaj sinonimaj esprimoj variigas la tekston	- la leksika vasteco ebligas liberan kaj fluan disvolvon de la kompleksa temo - la produktita teksto estas laŭcele preciza - la ripetoj estas evititaj per sinonimaj	- la vasta leksika repertuaro ebligas stilon plene konforman al la tema komplekseco kaj al la celpubliko - la produktita teksto estas

MODELTESTO DE LA EKZAMENO
UEA-KER C2
SKRIBA PRODUKTADO
SOLVOJ

Pritaksaj kriterioj	0 poento	1 poento	2 poentoj	3 poentoj	4 poentoj	5 poentoj	6 poentoj
		esprimoj, kio iomete malfaciligas la komprenon	esprimoj okazas, sed tio ne malfaciligas la komprenon			vortoj aŭ esprimoj - konvenaj derivaĵoj donas specialan karakteron al la teksto	preciza kaj nuancita - la trafaj vortelektaj, vortkreaj teknikoj kaj konvena uzo de idiomaĵoj igas la tekston ĝuinde altnivela
<ul style="list-style-type: none"> gramatika ĝusteco, komplekseco kaj varieco 	- la produktita teksto konsistas el aro de simplaj frazoj - troviĝas en ĝi sintaksaj eraroj, kiuj preskaŭ malebligas la komprenon de la frazo aŭ miskomprenigas ĝin	- la produktita teksto konsistas plejparte el simplaj frazoj - troviĝas en ĝi gramatikaj eraroj, kiuj malfaciligas la komprenon de la frazo	- en la teksto estas uzataj variaj verbotempoj kaj –modoj - la produktita teksto estas riĉa je prepoziciaj esprimoj - enestas kelkaj eraroj, kiuj ne malfaciligas la komprenon	- en la teksto estas uzataj variaj gramatikaj strukturoj, sed ilia esprim-povo ne ebligas precizan tekstigon de kompleksaj ideoj - aperas nur 2-3 eraretoj, kiuj ne malfaciligas la komprenon	- en la gramatike senerara teksto estas uzataj laŭcele variaj gramatikaj strukturoj - la ĝusta uzo de subjunkciaj prepoziciaj kaj participaj strukturoj ebligas esprimi kelkajn	- la varia kaj senerara uzo de ĉiuspecaj gramatikaj elementoj ebligas precizan esprimon kun emfazo kaj diferencigo koncerne kompleksajn ideojn kaj ideorilatojn	- la varia kaj senerara uzo de ĉiuspecaj gramatikaj elementoj kaj strukturoj ebligas precizan, nuancitan esprimon de kompleksaj ideoj kaj rilatoj - la kandidato havas la gramatikajn rimedojn por

MODELTESTO DE LA EKZAMENO
UEA-KER C2
SKRIBA PRODUKTADO
SOLVOJ

Pritaksaj kriterioj	0 poento	1 poento	2 poentoj	3 poentoj	4 poentoj	5 poentoj	6 poentoj
					kompleksajn ideorilatojn		senlimige esprimi sin, emfazi kaj diferencigi laŭbezone